



# TEA-BULTENO

25<sup>A</sup> JARO - N° 164

NOVEMBRO - DECEMBRO

N. 11-12/2022

Lingvo absolute logika kaj tute sena je propraj karakterizoj estus lingvo senviva kaj tro peza.  
*Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917)*

## Saluton al mia kara Legantaro!

Jen denove sin prezentas al vi la TEA-Bulteno, kiun vi ne ricevis de jam pluraj monatoj. Multas la kialoj de ĝia malapero, pri kiuj mi ne deziras vin ĝeni. Mi varme esperas, ke iom post iom ĝia aperritmo ree iĝos pli regula, kiel en la pasintaj jaroj.

Rapide alproksimiĝas la jarfino, fino de jaro ne tiom pozitiva por la tuta mondo. Ĉiaspecaj malbonaĵoj trafis nin ĉiujn, sed ni perdu nek esperon nek fidon je pli trankvila estonteco. Ĉiam antaŭen ni iru, neflankiĝante...

Venontmonate, laŭkutime, la atento de la samideanaro estos direktita ĉefe al L. L. Zamenhof, okaze de lia naskiĝdatreveno, je la 15<sup>a</sup> de decembro. Cent sesdek tri jaroj jam pasis de tiam, sed la memoro pri li ĉiam ĉeestas en niaj koroj. Ni festege lin honoru!

Tial mi deziras omaĝi lin pere de interesa intervjuo, kiu estis publikigita en la dua numero de la revuo *Tra la Mondo*, aŭgusto 1905. Tiel titolas la artikolo:

### Doktoro Zamenhof.

« Intervjuita » (1) de AŬGUSTO MONTROSIER.

*Doktoro Zamenhof estas "la homo de l' tago". Al nia ĉefredaktoro, kiu ofte kaj intime proksimiĝis al li dum la kongreso, li bonvolis konigi siajn impresojn pri la jam pasintaj tagoj: siajn dezirojn kaj esperojn por la estonteco.*

*Bulonjo, Sabaton la 12<sup>an</sup> de Aŭgusto 1905*

*Jen finiĝis la Kongreso, kaj bone finiĝis, per la postvespermanĝo en Calais (Kaleso). Post kelke da horoj mi forveturos Parizon, kie mi dediĉos la kelkajn libertempajn tagojn miajn ankoraŭ ĝuotajn al la legantoj de "Tra la Mondo".*

*[...] Kion pli bonan mi povus fari ol kolekti impresojn de nia kara majstro. Mi do serĉas lin kaj lin renkontas [...]*

*Grava afero! Estas mia unua intervjuo, kaj intervjuo esperanta!*

*Doktoro Zamenhof akceptas min kun la mano antaŭigita kaj kun sia afabla kaj kutima rideto. Malantaŭ liaj okulvitroj, liaj bluaj okuloj, okuloj de Slavo revema kaj bona, direktiĝas al mi kaj mi admiras unu fojon plie tiun homon tiel ener-*

*gian kaj persisteman, malgraŭ timema ŝajno, ne altkreskan, kaj tamen tiel grandan per la genio.*

*Tuj kiam li scias la celon de mia vizito, lia vizaĝo lumiĝas, kaj mi ne bezonus aŭdi lin paroli por senti, ke li estas feliĉa super ĉia espero.*

*Z. - La rezultatoj de nia kongreso estas pleje kontentigaj: ĝi montris evidente, ke la lingvo tute ebligas libere paroladi; ankaŭ ke ĝi efektive naskas fratecon inter diversaj popoloj, por kiuj ĝi estos komuna ligilo.*

*M. - Vi do estas plene feliĉa...*

*Z. - Jes, kaj de l' unua tago ĝis la lasta, en Anglujo kiel en Francujo, mi vivadis en daŭra kontento.*

*Je tiu ĉi momento nubeto vidiĝas sur la frunto de l' Doktoro, kiu aldonas:*

*Z. - Eble, kelkaj ne estos kontentaj ĉar oni ne decidis kelkajn punktojn pri la organizado. Sed tio ĉi ne estis, nune, la ĉefa celo trafota. Tiu ĉi elmonro de nia ekzistado kaj de l' facileco de la lingvo, estas atingita pli ol mi esperis, kaj pri tio ni devas ĝoji sen malantaŭpenso.*

*M. - Ĉu vi forlasis la ideon de organizado?*

*Z. - Ne, ĝi evidente estus utila. Sed oni preferis ĝin forlasi, prefere ol naski malpacojn bedaŭrindajn.*

*M. - Por tute forigi iajn malpacetojn, kelke da personoj opinias ke niaj estontaj kunvenoj povus esti nur dediĉotaj je tiaj aŭ aliaj festoj, prezentadoj teatraj kaj aliaj elmontraĵoj publikaj.*

*Z. - Kompreneble tiaj elmontraĵoj estas tre gravaj; sed tamen veraj, plenaj kongresoj, kaj ne sole festoj, devos okazi ĉiujare dum kelke da tempo.*

*Ŝajnas al mi ke venis la momento por paroli pri la lingva komitato kaj la estonta kongreso. Pri la unua punkto, la Doktoro diras nur ke, ĵus tiun ĉi ma-*

